



aktuala

34-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001@gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj : ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.freehostia.com; esperanto.net; le.rnu.net; uea.org; liberafolio.org; eo.eventeo.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri nepo de Zamenhof (kvara lasta parto)
- Paĝo 3 - Jarkunveno, UEA Membraro
- Paĝo 4 - Magalhães en Kubo
- Paĝo 5 - Malferma Tago, Longa Kolego, Jules Verne
- Paĝo 6 - EU Parlamento
- Paĝo 7 - TEJA en Litovio
- Paĝo 8 - Superruzi, Klaku, Tradukilo, Malkoloniigo, Ŝrumpo
- Paĝo 9 - Esperanto ie malaperas ... en Hungario
- Paĝo 12 - Muammar Kadafi prezidas Afrikan Union
- Paĝo 13 - Mondaj komercmarkoj Malkoloniigo,
- Paĝo 14 - Poemaro
- Paĝo 15 - Incesto rivelita televide

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Septembro 2009

- 16 Lernokurso de Françoise Pellegrin rekomencis kun 14 novaj lernantoj
- 23 Semajna kunveno
- 30 Semajna kunveno

Oktobro 2009

- 7 Semajna kunveno
 - 14 Ĝenerala Jarkunveno 2009, efektivaj membroj nepre partoprenu
 - 21 Dua prelego de Seán Oriain pri "Toastmasters"
 - 28 Semajna kunveno
- Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

ZAMENHOF-STRATO, LIBRO PRI NEPO DE ZAMENHOF (kvara lasta parto)

Diras nepo de Zamenhof: "Forlasi Pollandon en 1959 ne estis facila sed ebla. Necesis longa proceduro kaj pacienca atentado. Iumomente, mi ricevis de la ŝtata instanco "nerefuteblan proponon" ŝanĝi la laborlokon, kion mi trafe komprenis kiel turno-punkto en la pasporta proceduro. Temis pri "memorkvarenteno". En la tiama epoko de sekretmanio oni rekonis konfidencaj kelkajn projektojn, pri kiuj aktuale mi estis laboranta. Por la tempo de la "forĝado" mi estis dungita kiel konstruinspektoro en viandindustrio... Ĝis nun, mi memoras la guston de viandaĵoj produktitaj laŭ malnovaj polaj receptoj por la superaj politikaj instancoj: kolbasoj, ŝinkoj, pasteĉoj, kies aromo poste mankis al mi en Francio."

En 1947, okazis en Bern, ĉefurbo de Svislando, la unua postmilita Universala Kongreso. Li kaj Wanda sendis saluttelegramon, por pruvi ke almenaŭ kelkaj membroj de la familio Zamenhof transvivis la militan hekatombon. Antaŭe cirkulis en la Esperanta gazetaro onidiroj ke pereis ĉiuj, kaj fantaziaj informoj pri ilia sorto. Li ne polemikis kun tiuj fikciaĵoj.

Rilate la Esperanto-movado, li ĉerpis la ekzemplon de siaj gepatroj, kiuj subtenis ĝin sed ne engaĝiĝis funkcie en organizan laboron. Tio estis konforma al la volo de L. L. Zamenhof, kiu, kiel sciante, subskribis sian verkon nur per pseŭdonimo 'Doktoro Esperanto' kaj deklaris ke "Internacia lingvo, simile al ĉio nacia, estas propraĵo socia kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi".

Tamen, en la jubilea Kongreso (Varsovio-1959), okaze de la centjariĝo de Zamenhof, li membriĝis en la Loka Kongresa Komitato. Sed li ne partoprenis la kongreson mem, ĉar koincido de gravaj cirkonstancoj kaŭzis lian urĝan forveturon.

Li ankaŭ partoprenis la Bruselan Kongreson en 1960 (lia nomo ne aperas en la listo de la 1868 kongresanoj listigataj en la oficiala libro, sed ni scias ke la partoprenintoj estis 2030, do li enskribiĝis malfrue kaj mi konjektas ke lia nomo aperis en la bultenoj disdonitaj ĉiutage dum la kongreso), sed nenium alian ĝis Varsovio 1987: centjariĝo de Esperanto. Tie ankaŭ, li suferis multe pro la partiecej artikoloj de ĵurnalistoj, kiuj eĉ dubis pri lia poleco. Nur post sia emeritiĝo, kiam li ne plu estis konsiderata kiel eventuala funkciulo en la movado, li komencis akcepti invitojn, ekzemple de la Brazila Esperanto-Ligo (BEL) okaze de la speciala parlamenta sesio honore al Ludoviko Zamenhof. Ĝi havis lokon en la parlamentejo, en la ĉefurbo Braziljo, la 14-an de aprilo 2000. Pli frue, li kontemplis kiel konstruĝeniero Braziljon, kiu ravis lin. Kompreneble li profitis la okazon por viziti Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia en Alto Paraiso...

Nun ke li estas mem avo, la rolo de la "nepo" plaĉas pli kaj pli al li!

Antaŭe, mi resumis la 100 unuajn paĝojn de tiu libro, proksimume la unuan trionon. La sekvo de la libro montras la profundecon de penso de la aŭtoro, Roman Dobrzynski, kaj lian grandan erudicion.

Li klarigas ekzemple la diferencon inter Litovio kaj Litvo : «Litvo estas ĉerpita el la pola lingvo. Ĝia signifo ampleksas ne la "landon de litovoj", kiu estas

Litovio, sed la regionon, kiu formiĝis dum la procezo de la komuna pola-litova historio kaj karakteriziĝis per la plureco de gentoj, religioj, lingvoj kaj kulturoj.»

L. L. Zamenhof parolas pri “hebreoj” kaj ne “judoj” sub la influo de la rusa lingvo, kiu, simile al la itala, ne distingas la antikvan hebreon de la moderna judo. Li rekonas la babelan konfuzon de la lingvoj kiel malfeliĉo de la homaro, same kiel multaj homoj konsideras ĝin. Lingvaj malfacilaĵoj estas kripleco de la homa naturo.

Pluraj temoj en la 150 lastaj paĝoj. Ĉiuj estas ege interesaj. Mi konkludas per jeno : Se la nepo multe admiras la avon, ankaŭ la avo povas fieri pri sia nepo.

En tia rapida superrigardo de la libro, ne eblas profundumi en la filozofiajn pensojn, kiuj estas granda allogaĵo de la libro.

Hélène Falk - Bracke

ĜENERALA JARKUNVENO 2009

Okazos merkredon la dekvaran de oktobro, je la sepa vespere, en nia kutima kunvenejo de strato Van Maerlant 2. Ni kunvenas en konstruaĵo de E.U., ne forgesu vian legitimilon. Ĉiuj membroj estas invitataj ĉeesti, kaj povas kandidatiĝi por posteno de estrarano aŭ simpla administranto. Konforme al la statuto de Asocio sen profitcelo nur la administrantoj (efektivaj membroj) inkludante la estraro, formas la ĝeneralan kunsidon. Se vi estas unu el ili, via ĉeesto estas deviga. Administrantoj (efektivaj membroj), krom estraranoj, estas gesinjoroj Françoise Pellegrin (instruistino), Paulo Branco (eldonisto de Aktuala), Francine Sperber, Clara Bracke, Eric Baert. Se vi ne povas ĉeesti aŭ se vi ne plu volas esti administranto, bonvolu averti tuj la sekretarion, Hélène Falk al retadreso aŭ telefono ĉi-tie en unua paĝo.

Tagordo:

- 1-kasista raporto, kontrevizora elekto.
- 2-priskribo de la nuna stato de la Grupo fare de la prezidanto.
- 3-raporto de la sekretario.
- 4-malŝarĝo de la nuna estraro: Prezidanto - Angelos Tsirimokos;

Kasisto kaj delegito UEA - Claude Glady; Sekretario - Hélène Falk; Vicprezidanto - Georgia Henningsen; Informado - Michael Cwik; Sen difinita tasko - José Pinto da Sousa.

5-prezentado de la kandidatoj por la estraraj postenoj.

6-elekto de la nova estraro.

7-ĝenerala antaŭvidita agado, kaj agadoj por la jam komenciinta lerneja jaro.

Hélène Falk - Bracke, 17 septembro 2009

UEA MEMBRARA EVOLUO

Antaŭ unu jaro mi raportis, ke la 31-an de aŭgusto 2008 UEA havis 5540 IM individuajn membrojn, kio estis je 266 malpli ol samtage en 2007, kiam estis 5806 membroj. La definitiva nombro de IM en 2008 estis 5702, t.e. 309 malpli ol en 2007.

Ĉi-foje la situacio je la 31-a de aŭgusto estis iomete pli bona: 5604, t.e. je 64 pli ol antaŭ unu jaro. Oni povas antaŭvidi, ke kotizos ankoraŭ almenaŭ 100 membroj (pasintjare post aŭgusto 162), tiel ke la fina nombro devus iom superi tiun de 2008.

Jen la landoj, en kiuj oni jam registris pli ol 5 membrojn pli ol la definitiva nombro en 2008: Pollando (+124), Brazilo (+31), Francio (+26), Japanio (+6), Ĉeĥio (+17). Pli ol 5 membroj mankas ankoraŭ en Rusio (-45),

Vjetnamio (-17), Hungario (-16), Israelo (-15), Usono (-14), DR Kongo kaj Svedio (po -13), Hispanio kaj Nederlando (po -11), Aŭstralio, Ĉinio, Italio, Kroatio kaj Litovio (po -9), Madagaskaro (-8), Finnlando (-7). Notindas, ke en Vjetnamio, DR Kongo kaj Madagaskaro membroj grandparte estas "kanutanoj". La mankoj en tiuj landoj shuldiĝas al nesufiĉaj rimedoj de Fondaĵo Canuto. Sekve donacoj al tiu fondaĵo estas tre bonvenaj. Ne necesas diri, ke necesas ankoraŭ varbi membrojn por la nuna jaro. Mi ne revas pri reatingo de 6000 membroj jam ĉi-jare, sed almenaŭ 5800 estas atingebla nombro. Mi memorigas pri la plej malmultekosta kategorio MG Membro kun Gvidlibro (A-landoj: 10 euroj, B: 4 euroj). En la 80-aj jaroj oni kreis ĝin interalie, por ke ekzistantaj membroj povu membrigi samfamilianojn malmulte koste kaj donaci membrecon al amikoj kaj konatoj. La nombro de MG-membroj estis longe super 500, sed lastatempe ĝi malkreskas kaj preskaŭ duoniĝis. En tiu ĉi momento estas 282 MG-membroj. Tio eĉ estas je 1 pli ol en 2008, sed povus esti multe pli. Tricento da presitaj Gvidlibroj atendas en la CO ricevontojn. Se oni rigardas la prezon de MG-kotizo, oni konstatas, ke donaci iun oblon de MG-kotizo al multaj el ni ne estas granda ofero el mona vidpunkto, sed tio bele efike al la membrostatistiko. Kiu pretas donaci tiucele kaj ne mem povas indiki, kiuj estu membrigataj per lia/ŝia donaco, tiu povas lasi la decidon al la CO, antaŭ kies pordo staras multaj, kiuj arde deziras membrigi en UEA. Koran antaŭdankon en ilia nomo!

Osmo Buller

MAGALHÃES EN KUBO

Clay Magalhães, la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, faris laborviziton al Kubo de la 6-a ĝis la 12-a de septembro lige kun la preparlaboroj de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano (17-24 julio 2010). Magalhães vizitis la kongresejon, kies perfektan taŭgecon spertis jam la kongresanoj de la 75-a UK en Havano en 1990. Estis pluraj renkontiĝoj kun la Loka Kongresa Komitato kaj aliaj lokaj organizantoj, turismaj kaj kulturaj institucioj kaj kun flugkompanioj. Magalhães estis dufoje akceptita de s-ro Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, kiu plene apogas la UK-on kaj komisiis funkciulon, kiu estos en regula kontakto kun LKK por sekvi la evoluon de la kongrespreparoj. Magalhães konatiĝis ankaŭ kun la lokoj de la 43-a ILEI-konferenco kaj de la 66-a Internacia Junulara Kongreso. La esperantistaj instruistoj kunvenos en la semajno antaŭ la UK en la hotelo Canimao ĉe la rivero Canimar, proksime al la famaj plaĝoj de Varadero, dum TEJO kongresos tuj post la UK en la ĉemara kampadejo Los Cocos, 60 kilometrojn oriente de Havano.

Okaze de la vizito la Ministerio pri Kulturo kaj Kuba Esperanto-Asocio kunvokis gazetaran konferencon. Rezultis raportoĵo ĉe tutlandaj radiostacioj; ankaŭ la plej legata ĵurnalo de la insulo, "Granma", aperigis la novaĵon informante pri la UK kaj Esperanto. Radio Havano Kubo elsendis intervjuojn de Magalhães en la hispana kaj portugala lingvoj. Intervjuo de Magalhães por la Esperanta elsendo de Radio Havano estis aŭdebla ekde dimanĉo, la 20-a de septembro, ĉe www.radiohc.cu/esperanto kaj www.ameriko.org. Raporto pri la vizito de KKS legeblas en la paĝo de KEA, www.esperanto-cuba.org. G. Komunikoj de UEA N°339

MALFERMA TAGO PRI LAPENNA

La 31-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de novembro 2009, estos dediĉita al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Ivo Lapenna (1909-1987), la longtempa ĝenerala sekretario kaj prezidanto de UEA.

Prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna kaj redaktoro de la impona libro "Eseoj memore al Ivo Lapenna" faros dum la tago du prelegojn pri la vivo kaj verko de la legendeca oratoro kaj movada gvidanto, pri kiu personajn rememorojn prezentos ankaŭ prof. Duncan Charters. Krome oni montros filmojn kun fragmentoj el diversaj paroladoj de Lapenna.

Kiel reprezentantoj de la kongreslando de la UK en 2010 vizitos la Malferman Tagon ges-roj Norberto Díaz Guevara kaj Yoandra Rodríguez Labrada el Kubo.

Okazos ankaŭ prezentado de novaj eldonaĵoj, kiuj, same kiel ĉiuj aliaj varoj en la Libroservo de UEA, estos vendataj rabate. Kafo kaj teo estos senpagaj kaj en la senpaga loterio ĉiu gajnos ion. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

Pli frue la datrevenon de Lapenna omaĝis speciala programero en la 94-a UK en Bjalistoko. Tie estis lanĉita ankaŭ nova eldono de "Elektitaj paroladoj kaj prelegoj" de Ivo Lapenna, kies unua eldono aperis en 1966. La dua eldono, 166-paĝa, estas plivastigita per la festparoladoj de la aŭtoro en la UK-oj en Helsinko (1969) kaj Vieno (1970).

La libro kostas 9,90 eŭrojn (plus afranko kaj, en EU, imposto de 6%); rabato de 1/3 ekde 3 ekzempleroj.

G.Komunikoj de UEA, N° 338

LONGA KOLEGO

Longa kolego en Times Literary Supplement. En 2008 aperis monumenta verko de Geoffrey Sutton pri la literaturo de Esperanto (*vidu apuda bildo*). Ĝi estas la ĝis nun plej ampleksa monografio pri la vasta temo, kaj iom mirinde, ĝi estas anglalingva. Kelkaj esperantistoj jam proponis, ke oni traduku la verkon "Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto" al Esperanto, sed kompreneble la anglalingva versio povas atingi multe pli grandan publikon, kiu ĝis nun tute ne konsciis pri la ekzisto de esperantlingva literaturo. Plian paŝon direkte al sia potenciala publiko la elstara verko faris la 6-an de februaro, kiam en la pinte prestiĝa literatura revuo Times Literary Supplement aperis ampleksa recenzo de John Wells. Libera Folio publikigis la kompletan tekston de la recenzo. La traduko estas farita de Brian Moon kaj aprobata de J. Wells.



Geoffrey Sutton: Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto, 740 p. Libroservo de UEA: 48 eŭr.

ESPERANTO DE JULES VERNE

Universala lingvo por sentempa verkaro... Ni celebris en 2005 mortcentjaron de unu el la plej legitaj kaj tradukitaj aŭtoroj en la mondo: Jules Verne (1828-1905). Ja la homo monde konatas, ja liaj romanoj ege

alkiniĝis, tamen kiom da homoj povas citi pli ol 10 titolojn de la franca romanisto? Tiel estas stranga paradokso kronante verkaron de iu, kiu tamen skribis pli ol 80 romanojn kaj aliajn novelojn... Tiu terura konstato kontrastas ankaŭ kun realeco, kiun dum sia vivo spertis la verkisto. En 1894, Jules Verne malĝoje deklaris jenon al ĵurnalisto Robert Sherard: «*granda bedaŭro de mia vivo estas, ke mi neniam rolis franca literaturo.*» Verkaro de Jules Verne estas aparte kompleksa, multfaca, polimorfa, neatendita kaj ĝi tiel ofte antaŭas lian tempon. Kiel fakte ĉirkaŭ tiun tiel modernan, kleran, noviĝantan verkaron? En kiun kategorion ĝin ordigi, kiel ĝin ekstudi? Ĉu aliflanke necesus vere ĝin ordigi en ian precizegan kategorion...? Ne, certe ne. Ĉar riĉeco de tiu verkaro ja evidente kuŝas en ĝiaj originaleco kaj sentipeco.

Dum sia tuta aŭtoro vivo, tiu homo, klera atestanto pri sia tempo, scivolema pri ĉio, malferma al ĉiuj novaj formoj de progreso, sisteme enigis en siajn romanojn, la lastajn malkovrojn kaj revoluciojn starigitajn de scienco kaj tekniko de la epoko. Do tute kompreneblas ke fine de sia vivo, la romanisto interesigis al Esperanto. Tiu artefarita lingvo tial kernas en la kvar unuaj ĉapitroj de «*Studvojaĝoj*» (1903-1904), la lasta romano, pri kiu laboris la verkisto antaŭ sia morto, la 24-an de marto 1905. Michel, filo de Jules Verne, poste rearanĝis la tekston por publikigi ĝin sub titolo «*La miriga aventuro de misio Barsac*» (1914). Sed, de tiu nova versio, ĉiuj fragmentoj pri Esperanto mistere malaperis...

Sepdek jarojn poste, en 1981, urbo Nantezo, en kiu naskiĝis Jules Verne, akiris multajn neeldonitaĵojn de la verkisto. Tiel eltiriĝis manuskripto de Studvojaĝoj, kies sekva publikigo far Eldonejoj «Cherche-Midi» ebligis de tiam redoni al Esperanto la tutan lokon, kiun ĝi devis komence okupi en la paĝoj skribitaj de Jules Verne. Sed ankaŭ ol ni rekte lanĉigos en prezento kaj analizo en tiuj ĵus remalkovritaj ĉapitroj, ni unue interesigu al mondo de Jules Verne kaj al la diversaj influoj markintaj liajn skribaĵojn. Tiu vojaĝeto kernas de skribado, al fontoj de verne-a inspiro, ebligos pli bone kompreni kiel kaj kial Jules Verne tiel interesigis al Esperanto, tiagrade ke li faris el ĝi la centran elementon de sia Studvojaĝo. Lionel Dupuy, Elfrancigis Vincent Charlot

E-O EN EŬROPA PARLAMENTO

José Antonio del Barrio esploris la aferon por Libera Folio. La propono de la slovena eŭrodeputito Ljudmila Novak pri enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo de Eŭropa Unio estis malaprobata post voĉdono en la komitato pri kulturo kaj edukado de la Eŭropa Parlamento. Eĉ Ljudmila Novak mem ne atendis alian rezulton, sed ja esperis, ke ŝia propono kondukos al iom da publika diskuto pri Esperanto. La afero efektive ricevis iom da publika atento. Tie iom surprize montriĝis, ke ekzistis konkuranta amendopropono de Marco Capatto kun mencio de Esperanto. Ankaŭ ĝi estis rifuzita, kaj la originala vortumo de la raporto pri multlingveco estis aprobata per 20 poraj voĉoj, 3 kontraŭaj voĉoj kaj 8 sindetenoj. La debato baziĝis sur raporto kunordigita de portugala ano de la Eŭropa Parlamento, Vasco

Graça Moura, kun la titolo "Multlingveco: avantaĝo por Eŭropo kaj komuna engaĝiĝo", kaj ĝi eĥis diversmaniere en la landoj de la Unio. En Hispanio ĝi estigis fortan polemikon, pro la aprobo de amendo de parlamentano de la konservativa (popola) grupo favore al la rajto je instruado en la ŝtata lingvo. Tiu ŝanĝo estis konsiderata atako kontraŭ la sistemo uzata en Katalunio, kie la baza instruado estas farata nur en la kataluna, ankaŭ por denaskaj parolantoj de la hispana ...



Ljudmila Novak kaj Marco Cappato

... Krom amendo de Ljudmila Novak, aperis du pliaj amendoj kiuj menciis Esperanton. Temis pri amendoj 60 kaj 112, ambaŭ prezentitaj de Marco Cappato. Ili tekstis jene (la amendo celis la aldonon de la frazoj skribitaj grase):

Amendo 60:

Memoras ke pro tiuj kialoj, estas esence garanti la kvaliton de la instruado en tiu perspektivo; petas, do, al la Komisiono ke ĝi entreprenu paŝojn por enkonduki Esperanton kiel internacian fremdan lingvon en la edukaj sistemoj kaj de la membroŝtatoj kaj de landoj ekskluditaj de la procezo de tutmondiĝo, pro ĝia statuso de neŭtraleco kaj ĉar ĝi estas sufiĉe facila por ke ĝi estu funde lernita en

la daŭro de la deviga baza instruado; Amendo 112:

Rekomendas ke la indikilojn pri lingva kompetenteco oni ellaboru ankaŭ por la klasika greka kaj la latina kaj la internacia lingvo Esperanto ne nur ĉar temas pri komuna eŭropa heredaĵo el vidpunkto de la kulturo kaj la civilizo, sed ankaŭ ĉar la lernado de tiuj lingvoj povas taŭgi kiel apogo al novaj lernadoj kaj disvolvi la metalingvan pripenson.

Aliaj amendoj de Marco Cappato referencas al la lingva demokratio kaj al diversaj lingvaj rajtoj.

La amendoj de Marco Cappato kun rilato al Esperanto estis rifuzitaj. Laŭ mia scio, liaj proponoj ne estis interkonsentitaj kun la esperantistaj organizaĵoj. Ne estas aludo al ili en lia retejo, kaj ankaŭ ne en la retejo de Esperanto-Radikala Asocio, ligita kun la iama devenpartio de Cappato.

Ĝenerale, la origina informo de la deputito Graça Moura kaj la amendoj prezentitaj montras la diversajn sintenojn pri lingvoj troveblaj en la eŭropaj instancoj. Troviĝas preskaŭ ĉie laŭdoj al la diverseco kaj engaĝiĝoj por ĝin favori. Sed, kiel montras la rezulto de la voĉdono, la praktika rezulto ne ĉiam sekvas tiujn bonajn principojn ... *Toño del Barrio, Libera Folio*

TEJA EN LITOVIO

Post longa klopodado en la fino de decembro 2008 Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio estis oficiale registrita en Litovio. TEJA estas la unua internacia organizaĵo, kiu havas sian ĉefsidejon en Litovio. Tiu specifaĵo prokrastis la registradon, ĉar ĝis nun ekzistis precedencoj nur pri registrado de filioj de jam jure ekzistantaj internaciaj organizaĵoj kun ĉefsidejo aliloke.

SUPERRUZI, NE ATAKI

Strategio por Esperanto devas esti superruzi, ne ataki. Dek ses nudaj belulinoj ornamitaj per Esperanto-insignoj pli facile atingos la frontpaĝojn de la monda gazetaro ol la dek ses reguloj, skribas Georg Macioszek en sia artikolo pri nova strategio por informado pri Esperanto. Laŭ li, necesas uzi spektaklajn metodojn por superruzi la mondon kaj diskonigi la ekziston de Esperanto. "Greenpeace uzis ĉi-tiun metodon grandskale. Per sensaciaj kampanjoj la organizaĵo ĉiam denove sukcesis furori frontpaĝe en la gazetoj kaj finfine famiĝis mondvaste", li asertas.

KLAKU.NET REKLAKAS

La nur-esperanta socia retejo Klaku.net finis sian ekziston la 11-an de februaro. Laŭ la fondintoj ne indus daŭrigi la projekton, ĉar tro malmultaj retanoj uzis ĝin por popularigi tekstojn. "Ni daŭre ne komprenas kial la esperantistoj ne rimarkis la gravecon de Klaku.net, sed ni ne povas fari pli, la komunumo agas libere", la fondintoj skribis. La anonco pri la fermo de la reta projekto Klaku.net validis nur unu semajnon. Post la malapero de la retejo rapide aperis novaj volontuloj por daŭrigi la laboron. La 18-an de februaro la retejo reaperis kun nova prizorganto, Dmitrij Ševĉenko.

E-O AŬTOMATA TRADUKILO

Nova aŭtomata tradukilo lernas Esperanton. La administrantoj de Apertium traduka programaro komencis evoluigi version por aŭtomata tradukado el la angla al Esperanto. La teknologio estis origine evoluigita de la Universitato de Alakanto en Hispanio por aŭtomata tradukado inter proksimaj lingvoj,

kiel la hispana kaj la kataluna. Kataluna Esperanto-Asocio kaj Hèctor Alòs i Font antaŭ unu jaro kunlaboris en la projekto, kaj al la programo estis aldonitaj versioj por traduko el la hispana kaj el la kataluna al Esperanto. Nun la dana esperantisto programisto Jacob Nordfalk kunlaboras kun la teamo por aldoni tradukon el la angla al Esperanto.

ILO POR MALKOLONIIGO

Esperanto: ilo por la malkoloniigo. Survoje al la Nitobe-simpozio en Tokio, en la flughaveno de Hajderabado Giridhar Rao renkontis amikon, kiu kun du kolegoj estis veturanta al Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso por tie instrui la anglan lingvon. Li demandis, ĉu ne temas pri lingva imperiismo, kaj unu el la instruantoj tuj konsentis: "Jes", li diris, "nova imperiismo lingva, kaj ni povas fari nenion pri ĝi. Ni estas la soldatoj de tiu ĉi imperiismo, kaj kulpas same kiel la registaroj mem". Giridhar Rao argumentas, ke por malkoloniigi la menson, nepras iri for de la tradiciaj lingvaj iloj kiuj "tiom facile nur reproduktas la neegalecojn kiujn ni volas kontraŭbatali".

ESPERANTO IE ŜRUMPAS

Revuo Esperanto havas tridek jaroj da ŝrumpado. La pagata eldonkvanto de la revuo de UEA pasintjare unuafoje falis sub 4.000 ekzemplerojn. Tio videblas el la ĵus publikigita membrostadistiko de la asocio. Trarigardo de la ciferoj publikigitaj en la revuo Esperanto dum la lastaj tri jardekoj montras, ke post 1978 la ĉefa periodaĵo de Esperantujo perdis pli ol duonon el siaj legantoj. Pasintjare UEA havis pli ol du mil individuajn membrojn kiuj ne abonas la revuon. La kvanto de neabonantoj apenaŭ malkreskas, kvankam malkreskas la suma membraro.

ESPERANTO IE MALAPERAS

Budapeŝta Universitato malaperigas Esperanton. La mondfama Esperanto-fako ĉe la ĉefa Budapeŝta universitato ELTE malaperas. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni ĉesis akcepti studentojn, kaj la lastaj du nun okupiĝas pri siaj diplomlaboroj. La usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation faris provon savi la Esperanto-fakon, proponante financon subtenon, sed la internaj konfliktoj de la hungaria Esperanto-movado malebligis konstruan aliron. Ekde la jaro 1966 ĉe la Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de la Budapeŝta universitato ELTE (Eötvös-Loránd-Universitato) funkciis altnivela Esperanto-fako. Esperanton oni povis studi ne kiel ĉeffakon, sed kiel la unuan kromfakon. Unu el la ĉefaj motoroj de la Esperanto-fako ekde 1966 ĝis sia morto en 1987 estis István Szerdahelyi. En la Budapeŝta Esperanto-fako studis multaj konataj Esperanto-aktivuloj hungariaj sed ankaŭ alilandaj. Post la falo de komunismo en Hungario falis ankaŭ la prestiĝo de Esperanto kaj la ĝenerala interesiĝo. Samtempe la financado de la universitato estis striktigita, kaj antaŭ kelkaj jaroj la akceptado de novaj studentoj por la Esperanto-fako estis ĉesigita.

Dum kelkaj jaroj la nombro de studentoj en ELTE trioniĝis al malpli ol 10.000, kaj por ŝpari monon oni decidis devige pensiigi preskaŭ ĉiujn instruistojn pli ol 62-jarajn. Inter tiuj estis ankaŭ lekciisto de la Esperanto-fako, Iván Bujdosó, kiu iĝis 62-jara en la jaro 2006. Lia maldungo signifis ankaŭ, ke la universitato rezignis pri la planoj transformi la malnovan,

universitatnivelan Esperanto-fakon en novan, malpli ampleksan lingvan instruistan programon, kiu tamen ebligus al la studentoj ankaŭ estonte havi kursojn pri Esperanto kiel parton de sia universitata eduko. Ĉar la oficiala kialo por la maldungo de la lekciisto estis manko de financado, la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation serioze konsideris la eblecon kontribui al la salajrokostoj por konservi la Esperanto-programon ĉe la universitato.



Ŝildo de Budapeŝta Universitato

La sekcio de aplikata lingvistiko pozitive sintenis al la propono pri financa subteno, kaj printempe de la jaro 2007 Humphrey Tonkin kiel reprezentanto de Esperantic Studies Foundation persone vizitis la universitaton por diskuti la praktikajn detalojn. Tamen la dekanato de la katedro tute rifuzis renkonti lin, kaj la rektoro de la universitato ne konsentis subskribi kontrakton pri la financa subteno. En la sama periodo kulminis la interna skismo de la Esperanto-movado en Hungario. La nova sed mallongtempa prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, György Nanovfszky, denunciis la antaŭan

10

prezidanton László Szilvási ĉe la polico pro asertataj financaj misagoj, kaj la tuta hungaria movado disfalis en du batalantaj frakcioj. La skismo evidente influis la etoson de la vizito de Humphrey Tonkin, ĉar unu el la tri instruistoj de la Esperanto-fako eĉ ne partoprenis la kunvenojn. Sendube la skismo ankaŭ malaltigis la jam nealtan prestiĝon de Esperanto ankaŭ en la okuloj de la universitata estraro, kaj do nerekte kontribuis al la fina malperdo de Esperanto el la programo.



László Szilvási, eksa afergvidanto de Hungaria E-o Asocio

Intertempe la polica esplorado estis finita, financaj misagoj ne estis trovitaj, kaj la nova estraro de Hungaria Esperanto-Asocio publike pardonpetis al la senkulpe akuzita eksprezidanto. Tamen la skismo ne malaperis, kaj el la iam elstara Esperanto-fako de la Budapeŝta universitato restas nur du studentoj. Unu el la studentoj lastatempe en diskutlisto de hungariaj esperantistoj skribis: "La trista fakto estas, ke ni

estas la lastaj studentoj, ĉar la "kara" dekanato decidis, ke la fakto ĉesu la funkciadon. Verdire ni ofte sentas, ke ni estas superflua malgravaĵoj en la okuloj de la universitata burokratio."

Libera Folio

ESPERANTO EN HUNGARIO

En printempo de 2004 mortis s-ro Princz Oszkár, la tiam ĉefsekretario de Hungara E-Asocio. Ĝis la forpaso li estis la gvidanto de la centra oficejo de HEA en Budapeŝto. Post lia morto kolapsis la agado de la Asocio, kaj neniu estrarano zorgis pri la financoj. Pro la nepagado de fakturoj estis malŝaltita la telefono, la elektro, kaj ĉe la fino de la jaro la Asocio staris antaŭ financa bankrotiĝo. Laŭ posta esploro de Kontrola Komisiono de la Asocio fakturoj estis nepagitaj en sumo de 630 mil forintoj (ĉ. 6-monata tiam averaĝa monata salajro en Hungario). En fino de 2004 oni elektis novan estraron, kaj la taskon pri financa manaĝado por unu jaro prenis sur sin Szilvási László. Subtenite per laboro de kelkaj aktivuloj, per financa kaj infrastruktura helpo de "E-Asocio ĉe Eventoj, KEA", per akiritaj eksteraj subvencioj, per organizado de E-kursoj kaj vendado de lernolibroj ene de unu jaro li tute resanigis la financon staton de la Asocio. Kiam post 1 jaro Szilvási László retiriĝis el la estraro, laŭ la financa raporto de la Kontrola Komisiono de la Asocio estis repagitaj ĉiuj antaŭaj ŝuldoj de 630 mil HUF, estis pagitaj ĉiuj kurantaj funkciadaj kostoj, kaj la kaso de la asocio enhavis kroman 600 mil forintojn - kaj estis atendata alveno de pliaj ĉirkaŭ 500 mil forintoj.

Pri envio kaj denuncado: La sukceson de Szilvási László kaj liaj

helpantoj tamen ne ĉiu akceptis pozitive. La sukcesoj ĉe iuj vekis envion, ĉe aliaj timon pri eventuala perdo de sia influo. La tiam freŝe pensiigita prezidanto Nanovfszky György iniciatis revizoran kontrolon, kaj vortumis kontraŭ Szilvási László serion de akuzoj. Parto de ili estis ridindaj, sed kelkaj aliaj formis (senbazan) akuzon pri neleĝa prizorgo de asociaj financoj. Malgraŭ la protestoj kaj klarigoj de Szilvási László, surbaze de tiuj akuzoj Nanovfszky György iniciatis denuncadon kontraŭ Szilvási László ĉe la polico kaj ĉe la ŝtata impost-oficejo. Plimulto de estraranoj (*Baksa József, Dudich Endre, Eszényi József kaj Ködmön Károlyné*) ne kontraŭdiris al li, dum Acsádi Veronika (*reprezentanto de la junulara asocio*) forte protestis kontraŭ tio. Szilvási László kaj Acsádi Veronika konsideris la akuzan procedon kalumnio, kaj demisiis pri siaj estraraj postenoj en Hungara E-Asocio. Pro tiu kalumniado, plus la neakceptebla enhavo de la intertempe kompilita nova HEA-statuto – iniciatita same de tiu prezidanto – en fino de la jaro 2006 la Esperanto-Asocio Eventoj (KEA) kaj poste ankaŭ Hungara E-Junularo, HEJ ekŝiĝis el Hungaria Esperanto-Asocio kiel membroorganizoj. La polica esplorado de la afero daŭris preskaŭ tutan jaron. Estraranoj de HEA zorgis pri la diskonigo de la akuzo proceso al hungaraj aktivuloj, kaj ili eluzis por tiu celo ankaŭ kanalojn de Esperanta Civito. Tiu senbaza kalumniado fakte disbatis la tiam relative unuecan hungarian Esperanto-movadon, kaj ĝi dispartiĝis al du-tri partioj.

Pri publika pardonpeto al Szilvási László: Post ĉirkaŭ unu jaro, en oktobro 2007 estis fermita la esplora dosiero, kaj la ŝtata impostoficejo informis la gvidantojn de HEA, ke la akuzoj estas senbazaj, la agoj de Szilvási ne estis kontraŭleĝaj. Post 4-monata plua silentado dum la jarkunsido de HEA en marto 2008 fine d-ro Dudich Endre laŭtleĝis sian deklaron: "*Mi informas la Generalan Asambleon de Delegitoj de Hungaria Esperanto-Asocio, ke per poŝto mi ricevis la Decidon datitan la 25-an de oktobro 2007 en Győr de la Mezhungaria Regiona Enketa Oficejo de la Financ- kaj Dogan-gardistaro pri la ĉesigo de la enketo farita kontraŭ Szilvási László, "ĉar la ago ne estas krimago"...* ... *Kiel privata persono, mi konsideras mia morala devo publike peti pardonon de s-ro Szilvási László, estinta afergvidanto de HEA, pro la suspektado, kaj tion mi jen faras*". Lin sekvis ankaŭ prezidanto Nanovfszky György, kaj ankaŭ li petis publikan pardonon al s-ro Szilvási László. Poste unu post la aliaj faris same ankaŭ la aliaj estraranoj: Ködmön Károlyné, Eszényi József kaj Baksa József. Tiamaniere ĉiuj membroj de la Estraro de Hungaria Esperanto-Asocio petis publikan pardonon al Szilvási László pro la antaŭe farita de ili senbaza akuzado pri kontraŭleĝaj agoj kiel direktoro de la asocio. Tiu publika pardonpeto okazis la 1-an de marto en 2008 dum la ĝenerala jarkunveno de Hungara Esperanto-Asocio. Szilvási László respondis, ke li akceptas tiujn pardonpetojn. Tio signifas, ke li ne iniciatas rebatan juran proceson pro falsa akuzado.

MUAMMAR KADAFI PREZIDENTO DE AFRIKA UNIO




Muammar Kadafi, la libia gvidanto, estis nomumita prezidento (prezidanto) de la 53-landa Afrika Unio (AU) ĉe la AU-sidejo en la etiopia ĉefurbo Adis-Abebo. Li estis elektita "de la ŝtatestroj en privata sesio, por unujara periodo", proparolantino de la AU diris. En siaj antaŭaj sesioj, AU-delegitoj alvokis al ĉesigo de la embargo kontraŭ Zimbabvo. La voko sekvis la anoncon, ke la landa kontraŭstaro aliĝus al unueca registaro. Kadafi estis alvoko nomumita prezidento de la tanzania prezidento Jakaya Kikwete, ekŝiĝinta AU-gvidanto, dum aplaŭdoj de aliaj gvidantoj.

Kelkaj membroj de la AU estis, tamen, laŭdire maltrankvilaj pri lia kandidatigo. Kadafi laŭlonge antaŭenigis pli fortan union ene de la organizajo kaj antaŭe skizis sian vizion por kontinentolarĝa registaro. Li ankaŭ antaŭe diris, ke li volas ununurajn afrikajn trupojn, ununuran valuton kaj ununuran pasporton por Afrikanoj kiuj volas movi ene de la kontinento. Parolante al internaciaj gazetoj, Richard Dowden, direktoro de la Reĝa Afrika Societo, diris : "Ĉi tio diras multon pri kion afrikaj gvidantoj opinias pri la Afrika Unio. Ili esperis, ke tio donos grandan novan gvidantaron al Afriko, estigi senton de kunlaboro kaj

solidareco ene de Afriko, eĉ se ili ne unuiĝos politike. Iom post iom ĝi akiris ĉiujn ĉi aspirojn esti klubo de demokratioj, kaj la nova prezidento estas viro kiu estas diktatoro de 40 jaroj. Mi pensas, ke tio klarigas kiel afrikaj gvidantoj pripensas siajn proprajn aspirojn estigi kontinenton de demokratio kaj malkaŝemeco kaj respondigebleco, la speco de aferoj al kiuj ili aspiras".

En lia inaŭgura parolado, Kadafi diris : "Mi esperas, ke mia mandato estos tempo de grava laboro kaj ne nur vortoj. Mi ankoraŭ insistas, ke niaj suverenaj landoj klopodos por iĝi unuiĝintaj ŝtatoj de Afriko." Li agnoskis tamen, ke afrikaj gvidantoj "ne estas proksime de tia aranĝo". "Ni ankoraŭ estas sendependaj ŝtatoj. Estas via decido respondi al tiu ĉi alvoko al unueco, puŝi Afrikon antaŭen al unuiĝontaj ŝtatoj de Afriko," li diris. En privata debato, Muammar Kadafi ne ricevis subtenon por la ideo de "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Afriko". Gvidantoj decidis male konsideri metodojn por vastigi la mandaton de la nuna AU-Komisiono, kiu estos renomita la "AU-Aŭtoritato".



Flago de Afrika Unio

La nova Aŭtoritato havos prezidenton kaj vicprezidenton, kaj la aktuala oficejo de AU-Komisionestroj transformiĝos al sekretarioj "dividataj kompetentecoj" interalie reduktado de malriĉeco, infrastrukturo, malsanoj kaj epidemioj,

paco kaj sekureco kaj internacia krimo kaj terorismo.

"Kadafi havas teruran pasintecon en Okcidenta Afriko, ĉar li subtenis kelkajn tre aĉajn movadojn en Liberio kaj Siera-Leono, kaj helpis al ribeloj en aliaj landoj sub ĉi tiu ideo de revolucia Afriko. Hodiaŭ li transformiĝis, li hodiaŭ provas flirti ĉiujn reĝetojn de Afriko, ĉiujn malnovajn reĝlandojn", diris menciata Richard Dowden de la Reĝa Afrika Societo. Lastan aŭguston, renkontiĝo de pli ol 200 afrikaj reĝoj kaj tradiciaj regantoj donis la titolon de "reĝo de reĝoj" al Kadafi.

Oficiala programo de AU pintokunveno estas pri plibonigo de infrastrukturoj, kiuj laŭ fakuloj estas havendaj ĉar Afriko alfrontas la tutmondan finanĉan krizon. Sed konfliktoj kaj krizoj en Sudano, Somalio, Zimbabvo kaj orienta parto de la Demokratia Respubliko de Kongo certe, kiel kutime ĉe AU-pintokunvenoj, flankenpuŝas la oficialan tagordon.

eventeo.net

MONDAJ KOMERCMARKOJ

Malantaŭ la skandalo de melamino en bebolakto en Ĉinio estas kreskanta krizo je korporaciaj komercnomoj aŭ markoj. Unu celo de globaj markoj estis, ke konsumantoj ne povus scii kie varoj fariĝas. Sed post la skandalo en Ĉinio kiu mortiĝis almenaŭ 4 bebojn kaj malsanigis milojn, konsumantoj demandas kial siaj plej amataj "lokaj" biskvitoj kaj laktaĵoj fariĝas alilande.

Dum la 1980 jaroj grandegaj manĝaĵaj kompanioj freneze aĉetis lokajn kompaniojn por akiri pli grandan parton de la merkato. Jam en la mezaj 1990 jaroj, kompanioj kiel Nestle, Unilever kaj Kraft posedis la plej grandan parton de la merkato de vasta rango de manĝaĵo. En kelkaj landoj ili staris akuzitaj de monopolo kaj prezofiksado.

13

Je la fino de la 1990 jaroj aperis nova financa logiko. La markoj mem estis valoraj, kaj sia valoro kreskis per Wall Street magio pli ol per plibona fabrikado. Rezulte, okazis raciigo, rekonstruado kaj konsolidigo. Se nur malmultaj mondaj markoj ekzistas, la monvaloro de la restaĵo kreskas. Nestle kaj Unilever nomis tiujn "markoj bilionvaloraj". Kraft posedis 10 "monpovaj markoj" je 2008. Poste, multaj lokaj markoj aĉetitaj en la 1980 kaj 1990 jaroj vendiĝis aŭ malaperis, kaj multaj oficoj malaperis. Kelkfoje la monda marko estis nomo apud la loka marko, sed poste, la globa marko malaperis aŭ kaŝiĝis. Ekzemple, la glaciaĵo de Unilver portas la nomon Olá en Portugalio, Kibon en Brazilio, Walls en Britio kaj la Asio/Pacifiko regiono, Selecta en Filipinoj, Kwalita en Hindio, Algida en Italio, Langnese en Germanio kaj Raja en Hispanio. Konsumanto ne povas scii kie produktado okazas, ili kredas, ke ili aĉetas lokan manĝaĵon. Lojalaj klientoj daŭre kredas, ke la manĝaĵo vere fariĝas de Nestle, Unilever kaj Kraft, sed vere la laboro iras al subkontraktistoj, nomitaj "helpopakistoj". En Usono pasintjare, miloj da dombestoj mortis aŭ malsaniĝis per manĝaĵo de "helpopakisto". Eĉ konsumantoj kiuj scias pri subkontraktistoj fidas al la patrokompianoj pri kvalito, sed tio estas vana espero. Homoj tra la Asio/Pacifiko regiono nun konstataŝ, ke multaj manĝaĵoj fabrikaĝas en Ĉinio. Kiam tio okazis? Kiam tio vastiĝos tramonde? La pakaĵo diras "Fabrikita en ...", sed je Nestle kaj Unilever, tio eble aludas al la presaĵo sur la pakaĵo. Diversaj lando havas tre diversajn nivelojn de kvalito kontrolado. La skandalo pri infekto per melamino kreskas, kaj finfine, la monda marko difektiĝas kaj perdos fidon.

www.labourstart.org/eo/

14

VIA LETERO

Via letero. Via letero estas bela, estas pasia: estas kiel en la aero skribita per blua sunradia

lumoj; impulsa, kiel l' korbato de via animo, en belstiloj. Flirtas ekde via amrilato, kiel per papiliaj flugiloj,

viaj literoj, geometriaj desegnoj de via vorto-sento; torento de pensoj melodij alveninte al mia silento.

Via letero, kiu alvenas al mi en ĉi tiu vesperhoru, el via animo, al mi trenas, la mesaĝon de via amkoro

por rekuraĝigi la animon mian, pere de tenera amo kiu aj! , forlasas mian timon al via brulanta amo-flamo,

kie konsumiĝas kiel fumo. Simile al leterkolombina poŝto, venas via animlumo feliĉigante min, bel- Regina.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Eŭskio, Hispanujo

PREĜO

Sinjor', noktiĝis kaj l' anim' mizeras. Grandis la vol' kaj la dolora pado! En damaĝa silento nun postveras l' universala mar' kaj la saŭdado (1) .

Sed pri kreita flam' far viv' en ni, se plu l' animo blovas, ĝi plu vivas. Sub cindroj kvazaŭmorte fridas ĝi: la mano de la vento ĝin pufivas.

Donu la blovon, kiu la streb-flamon renovigas, domaĝan aŭ ansian, kaj rekonkeros ni re la Distancon - de l' maro aŭ alian, sed la nian!

Mesaĝo de Fernando Pessoa, tradukis João José Santos Literatura reta revuo "La Karavelo", Estremoz, Portugalujo (1) Simile al nostalgio, sopiro, hejmvoko kaj aliaj sentoj, sed ne nur. Ĝi temas pri grava ero de la portugaletna kulturo.

ARBARETO, VI LA VERDA

Tu, girele, tu ĵalioj

Arbareto, vi la verda, Kial vintre vi ne verdas? Mi verdados dum somero, Kiam estos ĉio bela.

Kial kukolet', la bunta, Vi dum vintro ne kokuas? Mi kokuos dum somero, Kiam estos ĉio bela.

Kial abelet', la griza, Vi dum vintro ne flugadas? Mi flugados dum somero, Kiam estos ĉio bela.

Kial knabinet', la juna, Vi dum vintro ne kantadas? Mi kantados dum somero, Kiam estos ĉio bela.

Popola kanto ellitovigita de Vincas Barcys, Litovujo forpasita je 5-1-2009 jaraĝa 86, laŭ Litova Stelo,

AMA DOLORO

Ho, kiel longe tion mi ne sentis; Ho, kiel longe amo min ne tentis... Vagadi tra pluveto, tra malvarmo, Ravite de silent', de nokta ĉarmo,

Spir-ĝui la aeron plor-retene, Kaj ion strebi - blinde, senkomprene... Mi benas vin, ho sankta kordoloro, Kaj nure preĝas nokte kun fervoro,

Ke vi ne lasu min... Ke vi min regu, Kaj la animon disĉifitan flegu... Aspiri ion per l' animo tuta, Ekvivi kun espero senrefuta,

Kaj kontraŭvole disaŭdigi l' krion: "Alvenu am', ekregu l' tutan mion!" Kaptadi lumon de l' fenestro fora... Ĉu povas esti io pli valora?

Paŭlo Paŝa Mevo Pavel Mojaev, Simferopolo, Krimeo, 27.10.2002

INCESTO RIVELITA TELEVIDE

Aŭstrala viro kaj sia filino petis komprenemon, post kiam ili rivelis dum programo de la nacia televido, ke ili havas incestan interrilaton, kaj havas filinon. John Deaves, 61-jaraĝa, vidiĝis en la televida programo "60 Minutoj" kun sia filino Jenny, 39-jaraĝa, kaj la 9-jaraĝa Celeste, kies patro kaj avo li samtempe estas. Sed ili insistis en la programo, ke ili estas "normalaj intelektaj plenkreskuloj". Sro Deaves diris, ke ili

ambaŭ "havis karierojn, havis normalan vivon kiel ĉiuj aliaj". Sro Deaves forlasis la familian hejmon kiam sia filino Jenny estis bebo, kaj ne vidis ŝin denove por la sekvantaj 30 jaroj. Kiam la geedzoj renkontis, en 2000, ili komencis seksan interrilaton. Pasintmonate juĝisto malpermesis al ili, ke ili havu seksrilatojn reciproke kaj ili rivelis, ke ili jam havis alian infanon, en 2001 kiu mortis. Laŭ la juĝistoj, la infano de la geedzoj kiu mortis en 2001, mortis pro denaska kormalsano nelonge post la naskiĝo.

eventeo.net

LegomojOLE OSTERMANN

Unu el la plej aktivaj kaj fidelaj membroj de EBG